# BULTENO

## DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.

No 10. Januaro 1954 Aperas laŭbezone

JULIE Š U P I C H O V Á - sepdekjara.

Antaŭ ne longa tempo ni festis la 70an naskiĝtagon de niaj pioniroj dro Pitlík kaj dro Kamarýt kaj nun ni rememoras, ke la 27an de januaro atingas la saman aĝon konata ĉeĥoslovaka Esperanto-laborantino samideanino Julie Šupichová. Estante esperantistino de post jaro 1907, s-ino Šupichová estis aktiva en diversaj kampoj de la movado. Ŝi paroladis kaj instruis, sed pleje ŝi distingiĝis kiel verkistino kaj kunlaborantino de gazetoj. Ŝi estas aŭtorino de konataj E-lernolibroj kaj de sennombraj gazetaj artikoloj pri E aperintaj en ĉsl. gazetaro.

Nia Bulteno en la nomo de EK en Praha kaj en la nomo de multaj ŝiaj amikoj prezentas al s-ino Julie Šupichová siajn plej sincerajn gratulojn.

\- -

ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR. Ni atentigas denove precipe niajn eksterlandajn amikojn (E-organizojn, gazetojn kaj eldonejojn), ke EAĈSR kaj ĝia organo "Esperantista" ne plu ekzistas. Nenion sendu al ĝiaj antaŭaj adresoj (Praha XIX aŭ Praha II), sed se vi opinias konvene informi la ĉeĥoslovakan esperantistaron pri la movado, bonvolu sendi viajn eldonaĵojn al la prez. de EK en Praha.

\- -

HEROLODO DE ESPERANTO 1954. Ni ne povas diri ankoraŭ, ĉu ni povos liveri tiun revuon senpage ankaŭ dum 1954. Se sufiĉos tempo, ni donos informon pri tio en nia Bulteno. Ni atentigas jam nun, ke ni ankaŭ nunjare devas insisti pri tio, ke ĉiu ekzemplero estu legata de laŭeble plej multaj samideanoj. Ne bonvolu kun ni nun korespondi pri tiu ĉi afero, sed vi povas nin mallonge informi, kiamaniere estas utiligata la ekzemplero de "Heroldo", kiun vi ricevas de ni.

GRAVA ATENTIGO !!!! - - !!!! NOVA KUNVENEJO!

DEPOST LA 13AN DE JANUARO 1954 ESPERANTISTOJ EN PRAHA KUNVENADAS REGULE ĈIUMERKREDE EN ŽENSKÝ KLUB, SMEČKY, PRAHA II. VIZITADU REGULE KLUBAJN ARANĜOJN

! ! ! ! ! - - - - - KAJ SUBTENU TIEL LA MOVADON! - - - - - - ! ! ! !

Al Eli U r b a n o v á

Mi gratulu al la poetino,
krome laŭdu versan flaton lertan.
Mi ne ploru pro certega fino
Ŝi pardonu konsileton spertan:

Ne al tiuj, kiuj provis gvidi
dankon diru, sed al kolektivo
konvinkita pro la sperto fidi,
ke nur en ĝi venkas ofensivo.

5.12.1953 Stan.Kamarýt

El la letero de prof.dro.Ivo Lapenna:

... estas mi, kiu devas gratuli al ĉiuj tieaj esperantistoj pro la vere kuraĝiga laboro, kiun vi ĉiuj faras. Neniu en Okcidento pli bone ol mi povas kompreni la grandecon de tiuj viaj ĉiamaj klopodoj. Por mi persone ili estas plikuraĝigaj ol ĉiuj rezultoj, kiujn mi atingis en la lastaj jaroj. Mi ŝuldas al vi ĉiuj mian profundan admiron, dankon kaj gratulon. Ĉiuokaze mi ne povas ne diri al vi, ke laŭ mia opinio la Movado troviĝas nun nur sur unu piedo. Mi faros ĉion eblan por fortikigi ĉiam pli kaj pli tiun unu piedon, tiel ke ĝi povu firme stari ankaŭ nur sur ĝi dum sufiĉe longa tempo. Tamen, ĝia vera tempo venos nur tiam, kiam ĝi denove ekstaros sur ambaŭ piedoj, nome kiam ni denove havos inter ni la tutan orientan movadon. Mi estas certa, ke pli aŭ malpli baldaŭ tiu tempo devas veni. Estu konvinkitaj, ke ĝis tiam ni ĉi tie tute certe vivtenos kaj larĝigos la Movadon, tiel ke en konvena historia momento ĝi povos - kiam ĝi ekstaros ankaŭ sur la alia piedo - ekmarŝi por definitive konkeri la mondon ...

PROGRAMOJ DE KLUBAJ VESPEROJ EN JANUARO:

| | | |
|---|---|---|
| 6.I. | Jaroslav Šustr | : Aktualaĵoj el Esperantujo. |
| 13.I. | Josef Vítek | : Aŭstralio de nuntempo (leteroj de B.M.Vosáhlo). |
| 20.I. | Dro Tomáš Pumpr | : Ĉirkaŭ la Bapto de Caro Vladimiro. |
| 27.I. | Jan Zemek | : Miaj gajaj travivaĵoj en Persujo. |
| 3.II. | Eva Suchardová | : La gloraj momentoj. |

- -

D ů l e ž i t é  u p o z o r n ě n í ! K dnešnímu číslu přikládáme složenky pro ty členy, kteří ještě nezaplatili členské příspěvky za minulý rok nebo za roky předcházející. Prosíme je, aby podle svých možností tyto příspěvky vyrovnali.

- -

NOVAĴOJ EN LA MOVADO

Regiona konferenco en Olomouc okazos 9-10 de januaro 1954 en hotelo Palace.

-

Esperantan seminarion en Lanškroun, kiu okazis de la 13a ĝis 20a decembro 1953, partoprenis entute 75 personoj el 14 lokoj.

-

AŬRORO, brajle presita organo de Blindula movado esperantista en sia lasta (vintra) numero alportas aron de belaj artikoloj kaj informoj: La paco (ĉiunumera ĉefartikolo, J.Kořínek: Ekbrilu stelo Betlehema, poemo, M.Meterlinck: La Blua Birdo (fragmento), Interplanedaj flugoj, Gejzero de Herľany, Hanaka humoro, Kristnaska pastoralo, Aŭrorklubo, Stenofrafia angulo, La Movado, Verda stelo sur la tombo, UEA, La internacia tago de blinduloj k.a. S-ano Vuk Echtner, malnova membro de nia Klubo, redaktoro de Aŭroro, meritas nian sinceran dankon pro lia oferema laboro por E inter la blidularo.

-

M a l g r a ŭ  ĉ i o. Ni ĝojas legante ĉiam denove el alia angulo de nia ŝtato, ke ne laciĝas la samideanoj plugi nian kampon. En Hradec Králové gvidas novan E-kurson sam.Jaroslav Dolanský.

-

LA FOLIO, organo de EK en Malmö, alportas en sia 9a nro de novembro 1953 noveleton "Tragedio sur la kajo" verkita speciale por tiu ĉi gazeto de nia membro Štěpán Urban. En la 8a numero aperis artikolo de Josef Vítek "Ankaŭ tio okazas". La gazeto represis en siaj nroj 3-4 alian novelon de Š.Urban.

-

Bonan flugfolion pri E eldonis Kroužek esperantistů, záv.org.ROH jámy Dukla, Dolní Suchá II. Mendu ĝin tie - 20 hel. unu ekzemplero - aŭ ĉe nia Klubo. Ne forgesu aldoni afrankon, se vi deziras plenumon de via mendo. La menciita E-rondeto liveras por 10 Kčs multobligitan lernolibron de Esperanto.

-

LA ĈEĤOSLOVAKA ARMEA ARTISTA ĤORO de Vít Nejedlý (AUS Víta Nejedlého) aranĝis plurajn koncertojn ankaŭ en Ĉinio. Pri sia interesa vojaĝo kaj sukcesoj preparis AAĤ en pluraj ĉsl. urboj paroladojn kaj dum ili ni kun ĝojo eksciis, ke niajn soldatajn kantistojn renkontis en pluraj ĉinaj lokoj esperantistoj. La parolanto deklaris, ke kun scio de E la Ĥoro estus ĝuinta sian vojaĝon multe pli bone.

Tuj liverebla:

- - -

| | | |
|---|---|---|
| GRANDA ĈEĤA-ESPERANTA VORTARO de fratoj Filip 656 paĝoj | ..... | Kčs 53,-- |
| ESPERANTISTA 1951 - la lasta jarkolekto en ne multaj ekzempleroj ankoraŭ havebla. Enestas ESPERANTA-ĈEĤA VORTARETO kaj MALGRANDA KORESPONDANTO. Krom tio aldone vortareto ĈEĤA-ESPERANTA | ..... | 12,-- |
| ESPERANTISTA 1950 - kelkaj ne multaj jarkolektoj | ..... | 6,- |
| URBO SUB SIGNO DE FAJRO (M.Majerová, trad.B.Vlčková) Al ĉiu mendita ekzemplero ni aldonas senpage 2 ekz.de LERNEJA REFORMO | ..... | 6,40 |
| Trikoloraj E-GLUMARKOJ de Dolfa Bartošík 10 ekz. | ..... | 2,50 |
| POŜTKARTOJ KUN PORTRETO DE ZAMENHOF 10 ekz. | ..... | 2,50 |
| O ZKOUŠKÁCH Z ESPERANTA (Dr. St.Kamarýt - Dr. T.Pumpr) | ..... | 2,50 |
| ESP. INSIGNO (verda stelo sur blanka fono) | ..... | 3,-- |

Ĉiuj prezoj enhavas la afrankon. Mendu ĉe s.Jar.Šustr, kiu sendos al vi pagilon por antaŭa pago. Ni ne povas liveri antaŭe kaj ankaŭ ne remburse. Ne postulu esceptojn, ne kompliku kaj ne grandigu nian laboron, absolute senprofitan!

---

Eldonnombro de nuna numero: 800 Venonta numero aperos en februaro.
Eldonas EK en Praha, koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

# VERDA VOĈO

I N F O R M A, I N S T R U A K A J A M U Z A B U L T E N O
D E S O M E R A E S P E R A N T O - K O L E G I O.

"VERDA VOĈO" !

Ĉu vi rememoras la kvarpaĝan gazeton hektografitan, kiu fieris esti unusola "ĉiutaga" gazeto esperantista en la mondo? - Kaj ĝi pravis! VV aperadis dum la somera dekkvartaga kursaro en Doksy (1947-52) efektive ĉiutage kun subtitolo "informa, instrua kaj amuza bulteno". La modesta gazeto plenumadis la tiel fiksitan programon tre konscience! Interesaj artikoloj pri esperantologio kaj esperantismo, originalaj poemoj kaj aktualaj ilustraĵoj, ĉiutaga kroniko pri okazintaj kulturaj kaj amuzaj entreprenoj, sensaciaj informoj de la "klaĉema" esperantisto, humorplenaj anoncoj kaj tiurilataj respondoj - jen la riĉa enhavo de la regule aperintaj numeroj de VV. - Ne mire, ke la kursanoj konsideris la VV sia sincera amiko, kies aperon ili ĉiam senpacience atendis, kaj ke VV ankaŭ fariĝis dezirata legaĵo de tiuj, kiuj ne povis ĉeesti en Doksy. Sen VV, kiu per sia interesa enhavo kompletigadis la lingvan instruadon, oni ne povus al si prezenti la fame konatan esperantistan somerrestadejon en Doksy kaj ties "Someran kolegion de Esperanto".

Kiam 4 entuziasmuloj la 21.VII.1946 malfermis en Doksy la unuan someran esperanto-kursaron, ili trovis eĉ mokridon kaj envion ĉe la oficialuloj, kiuj opiniis, ke la esperantista movado povus dumsomere, kiel ĝis tiam regule okazadis, profunde dormi. Sed la iniciatintoj ne ektimis la malhelpojn personajn kaj teknikajn, apogataj en la penado per la tiurilataj intereso kaj sopiro de la esperantista popolo, kiu en 8 someroj plenigis la kursaron, pli poste nomitan "Somera - esperanto lernejo" kaj ek de la j.1949 "SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO", per 1380 dankemaj gelernantoj. La kolegio per sia celkonscia instrumetodo, unikaj Ĉe-kurso kaj seminario, riĉeco de kulturaj kaj amuzaj entreprenoj kaj vere amika societa medio tiel famiĝis, ke ĝi devis malfermi filiojn eĉ en Slovakio (Svit 1950, Poprad 1952). La senĉesa kreskanta nombro de la partoprenintoj kaj speciala kvalifiko de la kolegiaj instruistoj (jam 11 en la j.1952) montris la popularecon de la "Somera kolegio de Esperanto" en Doksy kaj ĝian signifon por la kresko kaj kvalito de la esperantista movado en ĈSR.

Ĉar la ripetata restado en Doksy ĉe la Mácha-lago povus por certa (turisma) nombro de la kursanoj fariĝi iom enuiga, oni provis je ekstera propono aranĝi venonte la kolegiajn kursojn alterne ankaŭ aliloke kaj la okazigo de la kursoj en la j.1953 en KOST montriĝis kontentiga!

Ni esperu, ke la "Somera kolegio de Esperanto" sukcesos daŭrigi sian meritplenan poresperantan laboron ankaŭ en la j.1954. Do, ĝis la amika revido!

-oOo- Pi

M e l a n k o l i e . . .

Ĉu io? - Nenio! Mi scias,
ke vane mi, vane, elkrias.
Neniu ĉi tie min aŭdas,
la ondoj de l'tempo mallaŭtas;
kaj ie en ombro sub ŝranko
nur muso kuretas sur planko.
(Flora Ludanto)

-oOo-

"Verda Voĉo", la amiko de gelernantoj en Somera Esperanto-kolegio en Doksy, Svit, Poprad, aŭdigas sian voĉon:

Pasintjare en Kost pro gravaj malfacilaĵoj mi ne aperadis, sed ĝoju jam - mi klopodos denove vin gajigi en nunjara Somera Esperanto-kolegio kie ajn ĝi okazos. Ŝparu, karaj, por ke ni povu renkontiĝi. Mi povas malkaŝi, ke anoncis sin jam ses partoprenontoj. Mi havas bonajn kunlaborantojn. Nia devizo estu:

Kion neniu povas, esperantistoj povas!

-oOo-

Eĥo de sub la kastelo "Kost".

Belega aŭtuna dimanĉo! - Ĉar la vetero ŝajnis favora, senhezite mi decidis entrepreni ekskurson en mezon de alloga naturo. Post la naŭa horo nia aŭtomobilo haltiĝis, ĉu vi scias kie? - Rekte sub la kastelo "Kost" en la Ĉeĥa paradizo.

Jes! Ĉu povus esti pli inda loko ol tiu, kie denove la kolegianoj konvinkiĝis, ke nia kara lingvo enhavas daŭran potencon ligi homajn korojn al firma amikeco? Same, kiel dum la pasintaj jaroj en Doksy, ankaŭ sub la majesta historia kastelo "Kost" la geesperantistoj trovis ne sole ripozon, sed ankaŭ instruon kaj, kion mi plej alte taksas, scion, ke nia lingvo vivas, ke ĝi vivos ĉar homoj portas en siaj koroj neforigeblan volon kompreni unu la alian! Novaj adeptoj de nia lingvo konvinkiĝis pri altaj kvalitoj kaj seriozaj klopodoj de nia porpaca laboro kaj ili sentis sin inter ni feliĉaj. Ankaŭ la baroj inter esperantistoj kaj indiferentaj homoj, la vilaĝanoj tie falis. Ili vidis, ke esperantistoj scias sin amuzi dece kaj konvene, kaj ĉefe la sincera amikeco, reganta en nia kolektivo, plaĉis al ili.

Unufraze ni povas esti kontentaj pri farita laboro, ĉar "Kost" estas preta kiam ajn gastigi esperantistojn! Malrapidpaŝe mi promenis tra la valo de sankta Prokopo. Multaj miaj rememoroj fuĝis ĝis al vi, vivantaj en lokoj malproksimaj. Ĉu ne tintis en viaj oreloj?! Floroj sur herbejo jam forvelkis, tial mi ne povis kolekti bukedon por vi, sed la naturo, kredu, ne estis malpli bela ol tiam somere. Mankis nur viaj voĉoj sub la muĝantaj arbaroj!

Mi revenis kontenta kun scio, ke esperantistoj trovis sub la kastelo "Kost" sian novan hejmon.

-oOo- Ŝo

Su-Se Somera Esperanto-kolegio en Kost 1953.

Esperanta verda rondo,
a ty v čele, milý Tondo,
loĝis sub kastelo Kost,
bylo nás tam tenkrát dost.
Ĉiuj gaje vivis kune,
i počasí bylo slunné
iam eĉ ni banis nin,
skákali jsme do hlubin.
En la ĉarma suna brilo
to se nám to vejletilo
tra la ĉeĥa paradiz'
každý běhal jako rys!
Por la bela sankta celo,
Esperanto aby znělo
sub la flag' kun verda stel'
akuzativ každý dřel.

En la ĉarma ĉeĥa valo
každý dělal, co se dalo
kaj klopodis instruist',
že neměl čas ani jíst.
Ĉar vi zorgis mem pri ĉio
ty, náš drahý Antonio,
pro la nova verda id'
neměl ani v noci klid.
La lernantoj fartu bone,
proto nosil párky vonné,
post matena instruad'
každý míval hrozný hlad.
Oratoran kurson fari
k tomu třeba hodně páry,
gvidi ĝin en granda stil'
To ses, Tondo, zapotil!

Kiam venis la vespero
a na zámek padlo šero,
ŝvitis vi pro la klopod'
spáchat program lidem vhod:
iam dancis ni en balo,
někdy se též čarovalo,
kaj ĉe tio kun gracil'
zpívali jsme ze všech sil.
Sed ĉe ĉiu nia movo
měl's ty, Tondo, havní slovo
kvankam lacis ĉiu est'
věrně držel's celou Kost.
Ĉio iam devas pasi,
vzpomeň na ty krásné časy
En somera verda klas'
sejdeme se za rok zas!

-oOo-

P e r s o n a j a f e r o j.

Dro Aug.P i t l í k, dir. de SKED kaj dro Stan.K a m a r ý t, instr. de SKED, fariĝis dum la jaro 1953 sepdekjaruloj.
Magda S e p p o v á, instr. de SKED fariĝis en junio 1953 doktoro de filozofio.
Al ĉiuj ni sincere bondeziras!

-oOo-

K i o e s t a s k o l e g i o.
Kolegio ne estas kutimaj kursoj de iu lingvo, sed ĝi estas instituto - duagrada lernejo kun speciala instrumetodo kaj kvalifikaj instruistoj. Ne misuzu tiun ĉi nomon!

-oOo-

PLEJ GRANDAJN SUKCESOJN AL ĈIU SKED-FAMILIANO EN LA NOVA JARO DEZIRAS
LA REDAKCIO.

-oOo-

Praha, januaro 1954. -.-.-.-.- Redaktis A.S.